# ARTA EKSPOZICIO

Aranĝo dum la 81-a Universala Kongreso de Esperanto
en Prago

Franz-Georg RÖSSLER

Antauvorte

Arto kaj scienco - kontrasto inter diferencegaj sferoj de la vivo! Ĉu tiu ordinara taksado sub hodiauaj vidpunktoj ankorau povas esti valida? Ĉu arto ne bezonas sciencecajn sciojn, fonojn, kapablojn - scienco ne ofte artecan intuon, sentemon? Ĉu vivostiloj de artistoj kaj sciencistoj ne ĉiam pli identiĝas, arto kaj scienco ne ofte en la sama persono kunfandiĝas?

Demandoj sufiĉaj por la enmetado de artikolo pri artoevento en sciencan gazeton.

Prago '96

Propre muzikistoj, mi kaj mia edzino Rita Rössler-Buckel, jam de jardekoj verkas bildojn kaj plastikaĵojn en diversaj teknikoj. Post unua invito al ekspozicio en la jaro 1994 sekvis ene de du jaroj dekkvar publikaj prezentaĵoj de verkoj en- kaj eksterlande.

Ĝuste jarduonon antau la Universala Kongreso en Prago ni kuraĝis oferti al UEA bildoekspozicion enkadre de tiu ĉi evento. Ni pensis pri kultura, nekomerca aranĝo intence al prezentado de plej novaj pentraĵoj, kontribuo al la kongresa programo, instigo al komentoj kaj priartaj diskutoj, ekhavo kaj perado de kontaktoj eĉ eksterkongresen, agrablaj kaj incitaj babiladoj.

Dum diversaj kongresoj ni estis spertantaj, ke artistoj provis





vendi siajn produktojn ofte belaspektajn, sed la aranĝo, la prezentado aspektis foiraĉa, neorganizita, malkonvenaloka, mizera. Kontraste al tio ni intencis levi ankau tian bildoprezentadon al firma kaj digna kongresa punkto kiaj la muziko, la teatro, la diversaj sciencoj, la religioj, la prezentadoj de la diversaj suborganizaĵoj.

Niko Raŝiĉ, konstanta kongresa sekretario de UEA, montris sin interesita kaj promesis esplori la cirkonstancojn. Post sufiĉa tempo venis liaflanke letero aproba, ofertanta prezentejon antau la libroservo, do sufiĉe tauga kaj bone frekventita loko. En la kongreslibro oni indikis nian ekspozicion en aparta loko kaj ni konstatis, ke ni ne estos la solaj ekspoziciantoj. Ekmontriĝis, eĉ fotoportrete, kolego Praga, kiu kongreslibre deziris, ke liaj "bildoj plaĉu al la publiko". Nu, tiun ĉi deziron ni ne nepre havis, sed vere antauĝojis kolegan renkontiĝon.

Ni hejme pakis niajn dudek bildojn (mia serio sub la titolo "Kapoj" lakfarbe, la serio de mia edzino "Abstraktaĵoj" en akrila tekniko), sed iom timis ties pendigadon, ĉar kongresejoj disponas kutime pri glataj ŝtonaj muroj. Kien do meti la pendigilojn por la bildoj? La Praga LKK respondis tiun demandon nur post nia forveturado, sekve ni iom maltrankvile alvenis antau la deĵoranto-enirejo de la kongrespalaco en Prago. Baldau evidentiĝis, ke la kongreslibre prezentita kolego estis ano de LKK, kiu jam konis la ejon kaj la cirkonstancojn. Per ĉareto ni transportis kun li niajn eksponaĵojn ne - kiel planite - antau la libroservon, sed en la vestiblon de la dua etaĝo, eĉ pli impona ejo por ekspozicio, ja koridorego kun giganta fenestrofronto eksteren, vidalvide al la "Ora Prago", alte super la urbokerno. Ni estis ekspoziciintaj jam en tre dignaj historiaj konstruaĵoj, en kasteloj kaj pompe renovigitaj tabaksekigejoj, sed tian ravan lokon ni ĝis nun ne estis ornamintaj, firme baziĝanta en la kongresejo, same preskau ŝveba super renoma mondurbo.

Rapide ni konstatis, ke ankorau kelkaj aliaj ekspoziciontoj atendis la eblecon deponi siajn prezentaĵojn. Unuavide ni kun ĝojo perceptis, ke nia zorgo pri pendigado estis vana: UEA kaj LKK disponigis tre taugajn pendovandojn por la bildoj; profesia trupo instalis ĝin ĝustatempe kaj rektangule. Ankau vitrinoj estis videblaj. Estis plezuro, post la interkonatiĝo inter la ĉeestantaj artistoj kolegoj ekpendigi la bildojn. La unuopaj segmentoj de la koridora halo jam estis antaudestinitaj. La ĉeĥaj kolegoj - ni estis la solaj eksterlandanoj inter ili - jam estis okupintaj la teritorion "sub la suno", apud la fenestroj. Nin, iom pli ombre, atendis la interna muro. Sed tie atendis ankau akurate niaj antaumenditaj dudek metroj da muro, t.e. pendovandoj. Alia Praga kolego disponigis al ni grandajn blankajn subkartonojn. Tiel ni povis tre kontentige pendigi niajn dufoje dek bildojn, pro la veturigado en malgranda auto senkadrajn. Meze inter niajn du bildoseriojn ni pendigis informaĵojn kaj deponis "gastolibron" por enskribigi nomojn kaj opiniojn. Tion baldau imitis kelkaj aliaj ekspoziciantoj.

Ĉiam pli bone ni konatiĝis kun la kolegoj:

- Stanislav Krajícek, jam vizaĝe konata el la kongreslibro, LKK-ano gaja, ĉiam enmova,
- Jirí Ĉelikovsky ("Ĝorgiano/Ĉelli"), eminenta pentristo, kiu nur lastatage perfidis sin ankau kolego muzikista,
- Jaroslav Hradecky kun siaj plakaĵoj,
- Jindrich Havlik, grafikisto, kies grafikaĵoj ornamis la kongreslibron, la kongresejon kaj la ekspozicion,
- Blanka Zubová, simpatia iama instruistino kun skizoj pri ŝiaj Esperantaj aventuroj,
- Jan Nevan, kiu mendone pendigis la bildojn de liaj lernantoj pri la aktuala temo "Babelo au Babilono",
- Jirí Harcuba, profesoro, direktoro de la Artoakademio, akademia skulptisto, ano de la Honora Komitato de la kongreso.



La solena inaguro okazis lunde en la kongresosemajno. Ĉirkau ducent interesitoj ĉeestis. Michaela Lipari, UEA-komisiito pri kulturo, enkondukis varmavorte. Mia edzino kaj mi solenumis per muzikaĵoj flutaj/pianaj; la komponistoj estis G.F. Händel kaj L. Kupkoviĉ. Dum la semajno daure venis rigardantoj, okazis multaj babiladoj kaj nia gastlibro kaptis plurajn renomajn nomojn el Esperantujo. Ankau Praganoj vidis la ekspozicion, kvankam ne en tre granda nombro. La malfermiteco de la kongresejo kauzis, ke dignaj profesiaj gardoservistoj observis tage kaj nokte la eksponaĵojn. Ĝis nun ni neniam lasis niajn bildojn sub tiom bona protektado.

La modesta sinjoro, enmetanta siajn plakaĵojn el simpla aĉetosako en vitrinon, baldau elpupiĝis profesoro Harcuba, kiu malgrau siaj perfektaj scioj de la Germana kaj Angla lingvoj konservis la Esperantan idealon en sia koro. Ofte ni parolis kun li, ŝanĝis ideojn. Post la kongreso li sendis al ni sian "Esperanto-monon", iam oficiala ĉeĥa monero kreita de li, kun stelo, kiun li ĉiam rigardis ne ruĝa, sed la verda stelo de la Esperanta espero. La poŝtkarton kun lia propra *Goethe*-gravuraĵo el vitro mi postkongrese montris al lerneja kolego, *Goethe*-ano, kiu tiel almenau iom kaptis ideeton de la Esperanta kulturo.

Venis leteroj ankau de nia kolego muzikisto "Ĉelli", kiu petis informon pri lia *Karajan*-bildo *"Diabolus in musica"*, vendita laudire en Germanujon. Ĝis nun ni ne trovis spuron. Ankau la mendona pentradoinstruisto sendis fotojn kaj salutojn. Certe pluraj kontaktoj postrestos.

Rilate la organizadon la ekspoziciantoj povis esti plene kontentaj. Unuafoje - almenau en nia propra Esperanto-historio - UEA disponigis tre indan ekspoziciejon kaj pendovandojn, vitrinojn, kaj enprogramigis ankau la bildofaran arton en la kongresoprogramon. Dufoje la kongresa kuriero "Pragaj sonoriloj" menciis la ekspozicion. Informoj aperis ankau en pluraj gazetoj de nia regiono.

Nepre UEA daurigu tian artoaman agadon, ĉar ĉiam troviĝas bonaj bildoartistoj inter la kongresanoj, kapablaj al efika kontribuado al la kongresa etoso. Kaj arto ĉiam povas esti bonege utiligebla ligilo al la ekstera mondo, se oni ĝin fakte utiligas tiuĉicele. Tiun latentan faktoron UEA nepre elĉerpu estonte, por ke la kongresoj malfermiĝu al la cetera publiko.

Postvorte:

Kiom da sciencistoj trafis/maltrafis tiun kongresan ekspozicion? Almenau la ĉeestintoj laudis la ideon kaj ĝuis la etoson: nova ponto inter - laudire - antagonistoj.

Jen do persona, eble ne scienca raporto. Tamen, inter la linioj postrestos io daure kaptebla pri tiu ĉi evento Praga, almenau por la estontaj kongresaj historiografoj, farontaj esplore, priskribe, ordige, taksade el arto - sciencon.

Adreso de la autoro:
Franz-Georg RÖSSLER
Am Mönchsbusch 6
DE 67373 Dudenhofen
GERMANIO

*"Scienco kaj arto au - se oni volas - poezio kaj prozo deferenciĝas unu de la alia kiel vojaĝo kaj promenveturo. La intenco de la vojaĝo estas la celo, la intenco de la promenveturo la vojumado."*

*Franz Grillparzer*



# SCIENCO KAJ ARTO

Radoslaw NOWAKOWSKI (PL)

Scienco kaj arto estas du sferoj de la homa agado ekstreme diversaj kaj nenion komunan havantaj. Ŝajne.

Scienco strebas al plena logikeco kaj ŝatas konsekvencon, ĉasas paradoksojn kaj eliminas ilin senindulge. Arto estas ĉefe malklara, verkaĵoj kaj artaĵoj, eĉ geniaj, rajtas esti plenaj de kontraudiroj, antitezoj, fantaziaĵoj - iu sekva frazo povas nei kaj mokegi la antauan, kio paradokse plivalorigas la tuton.

Sed estas la supra priskribo de la scienco ne tro simpliga opinio? Aperas, ke sciencaĵoj povas esti pli frenezaj, folaj, fantaziaj kaj poezioplenaj ol artaĵoj, dum artaĵoj povas esti pli logikaj, konsekvencaj, malkovremaj - do pli sciencaj ol eĉ sciencaĵoj.

*Konrad Lorenz* postulis uzi intuicion (do ion ne plene kontroleblan, ion tenebran baziĝante sur nedifineblaj antausentoj) kiel sciencilo same valora kiel menso kaj prudento.

Ekzistas vasta sfero komuna, kiu aperigas sciencon kaj arton du flankoj de unu sama medalo: la scio. La dezirego e k s c i i estas kvazau ĉion trapikanta akso, kvazau ŝnureto, je kiu surfadeniĝas la bitoj de scienco kaj arto al magia kvadrato, kiu havigas la talenton, vivigi mortajn proporciojn kaj la kuraĝon, salti en la abismon de la nekonscio - jen la kondiĉo por ekscii arton.

L'arto ekzistas ne nur por nin ĝojigi, estetike ravi au abomenigi, sed por ke ni povu ankau ekscii kaj ekkoni la ĉirkauantan mondon kies ero ni estas, kvazau en vakuo plena de potencialoj.

Nur hodiau ni povas konstati, ke la plej fama, magia, mistera libro de *James Joyce* havas strukturon infinitezimalan. *Finnegans Wake*, jen la plej granda fraktalo literatura. Nenion li sciis kaj povis scii pri la teorio de kaoso, sed pere de plia senso ol nur pere de la komunaj kvin li povis komprenkapti plian aspekton de nia realeco, kaj li ne nur donacis al la fizikistoj la vorton *kvarko*.